

KATALUNA
ANTOLOGIO

KOMPILITA
DE
JAUME GRAU CASAS

BARCELONA

1925

0802

PREZO DE LA
“KATALUNA ANTOLOGIO”

416-paĝa volumo, formato 16 × 22 cm.,
presita sur linpapero

Por Katalunujo 12'— pesetoj
Por la Iberia duoninsulo 13'—

Por la ceteraj landoj:

15 pesetoj, 9 ŝilingoj, 2 dolaroj, 11 sv. frankoj



Mendu de:

S-RO EDUARD CAPDEVILA

Kasisto de la Komitato por Kataluna Antologio

Carders, 29 — BARCELONA

KATALUNA ANTOLOGIO

DE

JAUME GRAU CASAS

Recenzoj kaj opinioj

El «ESPERANTO» (Genève)

Ofte ni plendis pri malgraveco kaj maldikeco de esperantaj presaĵoj. Kataluna Antologio feliĉe surprizas per la malaj kvalitoj. Ĉiel laŭdiinda ĝi estas. Belega libro, riĉa enhavo, neta preso sur luksa nurlina papero, vera libramanta eldonaĵo, bibliotek-ornamo, ties fiero kies posedado. Ne nur la eksteraĵo estas plaĉa; ne malpli valora la teksto mem. Serioze scienca en la historiaj, lingvaj, literaturaj studoj, kaj ankaŭ ĉarma legaĵo en la antologia parto, aro da poezioj, skizoj, humorajoj, noveletoj. La kompilinto kaj verkinto de la plej multaj tradukoj versaj kaj prozaj, S-ro Jaume Grau Casas, konfesas, ke li oferis multjaran laboron por realigi sian celon. Li sinceran gratulon meritas de la esperantistaro, kiel ankaŭ liaj samnaciaj kunhelpintoj. Amo al patrujo kaj deziro diskonigi ĉien ĝiajn spiritojn kaj literaturan trezoron, fervoro al Esperanto, ilo de internacia reciproka kompreno kaj ŝato, jen ambaŭ sentoj, kiuj instigis, kuraĝigis la ĉeftlaborinton. Lia moto estis: «Ni volas honori la lingvon de niaj prapatroj per la lingvo de niaj pranepoj».

La kataluna lingvo, asertas la aŭtoro, estas ne filino, sed fratino de la provenca, do samdevena kaj samaĝa kiel aliaj latinidaj idiomoj. Post brila floraro en mezepoko, politikaj ĉirkonstancoj malhelpis ĝian disvolviĝon, kiu nur dum la lasta jarcento revigligis. Aparte interesa estas tio, ke S-ro J. Grau Casas konscias pri la neantaŭvidebla simileco inter la spiritoj de ambaŭ lingvoj, el kiu sekvas, ke la kataluna, ĉefe ĝia poezio, estas pli facile kaj pli fidele tradukebla esperanten ol alia. Lingvistoj ŝatos la komparon inter parencaj lingvoj, la rimarkojn pri saŭspecaj vortoj, sintakso aŭ elparolado de lingvoj kataluna, hispana, franca, itala. Ankaŭ la tradukmetodo, preciza sed ne trovorta, celanta tekston facilan, por ĉiu kompreneblan, estas taŭga. Neologismoj aŭ lingvaj novaĵoj ne ŝajnis necesaj al li, kiu prave diras tiun frazon, viprapon

por multaj novemuloj: «Tiu ĉi trovas grandajn mankojn en nia lingvo plej ofte montras nur proprajn mankojn». Pri la elekto de l' aŭtoroj kaj de iliaj tekstoj nur samnaciao povas juĝi; fremdulo nur konstatas, kiom valoraj por komparo inter naciaj literaturoj estas la ĉerpitaĵoj el malnovaj verkistoj, kaj kiom prave oni tamen lasis la plej grandan lokon por modernaj aŭtoroj; tiel oni pligrandigis la intereson de l' libro por la nefakuloj, kiuj, se ili ne ŝatas lingvistikon, literaturon, detalajn biografiojn, trovas plezuron en la multaj kantaŭtaj poezioj, spritaj rakontoj, romaneceaj paĝoj. La antologio do povas servi al beletristoj, profesoroj, studentoj, kaj same plaĉi al ĉiu legemulo.

Jen ĝiaj ĉefaj partoj. Unue ĉapitroj pri deveno, strukturo, disvolvigo de la kataluna lingvo, historio de la kataluna literaturo, celo de l' antologio. Ĉi tiu konsistas el tri partoj. Unue: Antikvaj aŭtoroj, kun notoj pri kaj tradukoj el ok verkistoj de la 13-a ĝis 15-a jarcentoj. Francoj rimarkos la grandan similecon inter la temoj traktitaj de francaj kaj katalunaj mezepokaj verkistoj. Due: Popolkantoj, kun studo kaj naŭ arioj akompanantaj tekstojn. Tiu dua parto jam aparte estis eldonita. Trie: Modernaj aŭtoroj, kies biografio kaj citaĵoj plenigas tri kvaronojn de l' libro. La granda nombro de poetoj ne mirigos ĉe la lando de l' iamaj trobadoroj.

Por ke la elektitaj tekstoj estu plejble interesaj, oni akceptis preferi mallongajn, tiel forigante ĝenerale scenojn de teatraĵoj aŭ ĉapitrojn de romanoj, kiuj sen resumo de tuta verko estas efektive tro erecaj. Pro la sama motivo, dezirante represi kelkajn paĝojn por konvinki pri la boneco de l' tradukoj, ni devis kribri la malpli ampleksajn; ili do nur estas specimeno de l' stilo, sed tute ne sufiĉaj por doni ideon pri la riĉeco kaj varieco de unu el la plej atentindaj verkoj en nia lingvo.

El «HEROLDO DE ESPERANTO» (Horrem bei Köln)

Kio? Literatura verko, volumo pli ol 400-paĝa? Ĉu vere? Ĉu vi surprizite ne diris tion, fidela «Heroldano», leginte la titolon? — Efektive, ĝi ekzistas, ĵus naskiĝis, verko inda je nia plej serioza atento kaj je nia senlima admiro. — Antologio! Nur antaŭ nelonge mi parolis ĉiloke pri antologioj (bulgara kaj pola antologioj) kaj opinias ripeton superflua. Sed mi certigas vin, ke la K. A. estas kaj estos senrivala laŭ ĉiuj vidpunktoj. — El du fontoj fluegas abunde la nektaro de arto kaj poezio en nia Esperanto-literaturo: Budapeŝt kaj Barcelona. Tie loĝas niaj poetoj kaj rekantistoj, modernaj trobadoroj, kaj ankaŭ mia samlandano Zanoni staras en la unua vico de niaj eminentaj poetoj kaj rekantistoj de poemoj. — Feliĉa popolo, kiu ĉerpas el la «Tresor literari de la milenaria llengua dels Catalans» (trezoro literatura de la miljara lingvo de la Ka-

talunoj). Efektive, la trezoro ne estas elĉerpebla. — Unue nun pri la volumego mem. La enhavo dividiĝas jene: I. Antaŭparolo. 1. La kataluna lingvo (historio, strukturo, teritorio, disvolviĝo). 2. La kataluna literaturo (ses ĉapitroj, de la XI-a ĝis la XX-a jarcento). 3. La «Kataluna Antologio» kaj Bibliografio. II. Antikvaj aŭtoroj (de 1235 ĝis 1500). III. Popolkantoj. IV. Modernaj aŭtoroj (de 1845 ĝis hodiaŭ). Detale pritrakti la kompletan enhavon ne estas eble; tuta paĝo almenaŭ estus necesa. Nur kelkajn rimarkigojn mi volas fari. La konciza ekzakteco de la prilingvaj ĉapitroj permesas preskaŭ detalan ekkonon de la gramatiko kataluna; Grau Casas, la meritoplena poeto kaj kompilinto, komparas sian gepatran lingvon kun la ceteraj latinidaj idiomoj kaj per fragmentoj Esperanta kaj Kataluna de «Ifigenio en Taŭrido» vidigas la relativan similecon inter ambaŭ lingvoj. — En la XVI-a jarcento komenciĝis dekadenco por la kataluna lingvo kaj ĝi renaskiĝis en la XIX-a kaj nun ĝi kreskas kaj floras kiel en sia ora epoko. — La dua parto (La kataluna literaturo) estas tiom riĉenhava kaj praktike aranĝita, ke ĝi povas servi kiel modela verko por studentoj; ĝi nepre anstataŭas ian ajn nacilingvan libron pri tiu fako speciala. Ni ekscias pri la kaŭzoj de la dekadenco lingva, politika kaj ekonomia, kiu tamen ne restis definitiva, sed foriĝis dank' al la kataluna spirito nevenkebla. La trian parton kiu donas necesajn kaj valorajn informojn pri la «Antologio», ĝiaj celoj ktp., la kompilinto fermas per jenaj paroloj. «Pro nia domo ni laboris, preparante la K. A., kiu celas diskonigi la frezoron de nia patra lingvo. En nia spirito fajre brilis du nomoj, dum la longa kaj malfacila preparo de nia verko: Esperanto kaj Catalunya... Al la du nomoj, al la du idealoj ni ĉiam donis nian koran fervoron: nur pro tiu entuziasmo ni kuragiis entrepreni la kolosan laboron de nia «Antologio», al kiu ni dediĉis kelkajn jarojn, la plej bonajn jarojn de nia... de nia alie sencela juneco». — Ĉu estas neceso aldoni, kio bonega rezultis el lia sankta entuziasmo? Certe ne. — Fortiriĝas nun la kurteno kaj ni eniras la pompan domon, muzeon preskaŭ senkomparan, halojn vastegajn de juveloj plenajn. Prezistoj rakontas, poetoj deklamas, trobadoroj kantas ludante sonplenan liuton. Ne tute fremda mi estas en la domo; foliumante en la libro mi rekonis kelkajn amikojn, kies kantojn aŭ versojn mi aŭdis 1909 en Barcelona okaze de nia V-a, kie artsoifa, kantema popolo kreis la Florajn Ludojn. — Vi sendube jam legis la dramon «Mistero de doloro», trad. de F. Pujulà, «La patrino», trad. de A. Sabadell kaj konas nacilingve la faman «Terra baixa» (malsupra lando) de Guimerà, kiun uzis Eugen d'Albert por komponi la tutmonde famekonatan operon. Perloj de la kataluna literaturo. Kvindek verkistoj estas reprezentitaj en la «Antologio», kaj la eldonintoj asertas, ke estas nur parto de la literaturistoj katalunaj; oni ne povis prezenti pli multajn pro la necbleco doni al la verko pli granda amplekson. — Grau Casas kaj aliaj katalunaj samideanoj faris la tradukojn senescepte bonegaj, artismaj. Menciinda estas nepre la unua

kvalita papero kaj la senriproĉe klara preso, kiu ne lacigas la okulon. — La librego ne estas multekosta rilate al ridinde etaj broŝuroj, kiuj svarmas en nia literaturo kaj kies elveno ofte estas duberaĵta. La prezo absolute ne egalvaloras la gigantan laboron de la kompiliito kaj de la fervoraj kunhelpantoj; tre modesta ĝi fakte estas. — Ni elkore danku niajn katalunajn fratojn por ilia fero kaj aĉetu la verkon. La servo, kiun ili faris al sia patrolando kaj al nia Esperantujo, trovos brilan rekompencan.

El «LITERATURA MONDO» (Budapest)

Impona libro, brila rezulto de multjara persista laboro de katalunaj esperantistoj. Sen troigo estas aserteble, ke *Jaume Grau Casas* per sia kompilaĵo donis la unuan perfektan antologion al nia literaturo. Tio ne signifas, ke la aliaj fariĝis malpli valoraj aŭ meritas riproĉon de ĵa kritiko. Tute ne. Simple mi konstatas, ke tiu ĉi verko havas individuajn stampojn de konscia kompetentulo, kiu penetris ĝis fundo de sia malfacila tasko, forviŝante la karakterizajn mankojn de maŝina kompilado kaj donante lingvosciencan bazon al la verko. Li nenie parolas laŭ frivole faufarona tono pri tio, kio estas sanktaĵo antaŭ la plimulto, sed tamen lia brava kuraĝo sentime aperigas antaŭ la leganto la historion de popolo, pri kiu ĝis nun multaj sciis preskaŭ nenion. Ĉio volita estas dirita objektivite, bibliografie. Nur en la Antaŭparolo kaj biografiaj partoj ardas la flamo, kiu rajte postulas respekton kaj simpatian por popolo vivivolanta, sed tio okazas sen ofenda atakemo.

La libro estas abunda fonto de klasika beleco. Pli ol 50 verkistoj, poetoj kuni pli ol 140 prozaj kaj versaj verkoj pledas elokvente por siaj lingvoj kaj popolo. Detale recenzi ilin neeble. Nur koncizaj frazoj povas doni koncepton pri grandiozeco de tiu ĉi verko.

I-a Antaŭparolo. La kataluna lingvo. En tiu ĉi parto kronologie estas pritraktata la historio de la lingvo, ĝia strukturo kompare al la lingvoj hispana, franca, itala, esperanta, informante pri la teritorio, kie ĝi evoluis kaj estas nuntempe parolata — kaj fine la disvolviĝo, kiu promesas belan perspektivon por la estonteco.

La kataluna literaturo. Dokumentaj pruvoj, pri originoj, vicigo de periodoj, en kiuj abundas interesaj historiaj, biografiaj priskriboj. Fine sekvas enkondukita parolo al la «*Kataluna Antologio*» kun bibliografia aldono pri antologio de katalunaj aŭtoroj; studoj pri la lingvo kaj ĝia literaturo. Jen la unua parto, kies enhavo eĉ por momento ne entigas la leganton, ĉar nevole estas sentate, ke tio necesas por taksii laŭvalore la verkon mem.

II-a Antikvaj aŭtoroj. Kvazaŭ ĉirkaŭprenus nin mezepoka atmosfero. Malgraŭ tio, ke la nuntempeco de Esperanto iom malfaciligas reprezentanti arhaikan stilon, tamen la donitaj fragmentoj vekas plenan iluzion.

IIIa Popolkantoj. Originala praforto de la popolanimo karakterizas ĉiun. Baladoj, kanzonoj, spicitaĵoj de superstiĉo, sentemeco, naiva ĉarmo kaj sincera larmo. La aldono de muziknotoj akcelas sukcese la valorrekonon de tiu ĉi parto.

IVa Modernaj aŭtoroj. Vera surprizo atendas la leganton. Trezo-rejo de literaturamanto, kiu laŭguste povas elekti el artaĵoj de nevola konkuro, kie ĉiu verko laŭdas per perfekteco sian majstron.

Gratulon meritas ĉiu kunlaborinto, sed ĉefe *Josep Grau Casas* la frato de la eminenta kompilinto. Lia laŭdinda aktiveco multon helpis al la belega entrepreno. La eldono estas lukso, ĉar al la enhavo kaj espereble el nenies biblioteko mankos la libro, kies posedo signifas veran pliriĉigon.

El «BELGA ESPERANTISTO» (Antwerpen)

Ni havas antaŭ ni tiun belegan kreaĵon de S-ro Jaume Grau Casas kaj ĝi iuspiras al ni simpatian admiron kaj grandan respekton: «Kataluna Antologio» estas grava verko en kaj por la Esperanto-movado. La enhavo estas interesa laŭ ĉiuj vidpunktoj. Juĝu mem: Post antaŭparolo, en kiu la aŭtoro konigas al ni la katalunajn lingvon kaj literaturon, ĉiun historian kaj disvolviĝon, la libro komenciĝas per la antikvaj aŭtoroj; sekvas granda kolekto da popolkantoj kun muziko, kaj finiĝas ĝin la modernaj aŭtoroj. Entute pli ol 150 tradukaĵoj. La intereso de la libro estas pligrandigata per la aldono de bonaj biografiaj notoj pri ĉiuj cititaj aŭtoroj.

Estas rimarkinde por la Flandranoj, kiom la fragmentoj el la verkoj de la antikvaj aŭtoroj kaj la popolkantoj similas mezepokajn flandrajn verkaĵojn. La samaj subjektoj, la sama instruanta tono; por la kantoj precipe la samaj belaj vortoj kaj la sama muziko — iom malgaja, plena je amo, estas troveblaj en ili.

Pli ol kvardek nomoj estas en la listo de la modernaj aŭtoroj. Prozo kaj poezio sinsekvas, unu pli bela ol alia. Kaj ofte ni rimarkis je ni mem, alvenante al fino de iu fragmento: bedaŭrinde, ke jam finiĝas... Sed pri tio konsolis nin tuj sekva versajo aŭ prozaĵo!

La Katalunoj vere trovis la bonan rimedon por konigi sian ekziston. Kaj ke la kunlaborintoj al tiu ĉi ĉefverko plene komprenis sian taskon, pruvas al ni la grava bibliografia parto de la libro.

Sed ni ne nur konsideru tiun unuan celon de la eldonintoj, ni ankaŭ klare akcentu la duan: la grandegan valoron de la libro por nia movado. Starigi tian monumenton estas unu el la plej efikaj propagandmetodoj, kiuj ekzistas. Ni esperas, ke multaj nacioj sekvos la ekzemplon.

La libro ne estas romano, nek kutima literaturaĵo, sed la tuta animo

de popolo, animo, kiu post jaroj da memforgeso sin retrovas kaj kiu donas per tia verko esprimon de sia interna vivado kaj pensado.

Se la klopodoj de S-ro Jaume Grau Casas kaj de lia plej diligentula kunlaborinto, lia frato Josep, estis gravaj kaj malfacilaj, la rezulto de tiu penado ilia certe ilin plene rekompencos. Ĉar la verko estas tia, ke ni, Esperantistoj, nur povas bedaŭri, ke nia Majstro ne plu estas inter ni, por ke li vidu kaj juĝu, kiamaniere malgranda popolo sin konigas dank'al lia kara lingvo internacia.

Ni forgesis diri, ke la libro sin prezentas en luksa eksteraĵo. Resume, ni povas diri, ke la eldonintoj tute ne transiris la limon de la vero, kiam ili anoncis «Monumenton»!

EL «POLA ESPERANTISTO» (Warszawa)

Jen vere belega, utila kaj inda dokumento. Jen homoj, kiuj komprenis la celon kaj utiligon de Esperanto. Kritikon mi devus fari pri tiu libro: Vortoj mankas por esprimi mian admiron pri ĝi. Kion ne povus fari popolo, kiu scias esprimi kaj montri sian volon? Per kio plej bone oni pruvos sian vivon ol per monstro de tiu vivo mem? Ĉu la lingvo kaj literaturo de popolo ne estas la esenco mem de ĝia vivo? Per tiu Antologio, la Katalunaj samideanoj pruvos ne nur la vivkapablon de Esperanto kaj la vigelecon de ilia organizo kiel Esperantistoj, sed ili pruvos la vivpovon, kulturon de sia lingvo kaj literaturo. La Kataluna lingvo estas unu el la plej malnovaj el ĉiuj latinidaj, kaj unu el la plej flekseblaj kaj esprimplenaj. En tiu bonega libro, ni trovas ĝian historion, kun instruigaj komparoj, kaj ni retrovas la fortan popolon ĝin parolantan.

Jam la Trobadoroj pruvos ĝian poezion kaj ĝian forton ne nur en siaj «Sirventes», (satiroj, kiujn ili sciis uzi por liberigi sin el siaj malamikoj, ekscitante ilin unu kontraŭ la aliajn). Dum ili batalis inter si, la Pireneoj ĝuis la pacon kaj trankvilon. Ni sekvas la disvolvigon de tiu literaturo, de la mezepoko ĝis niaj tagoj! Kia ĝuo legi tiun mezepokan literaturon, konstati ĝian facilecon kaj profundecon samtempe! Jen mirindaj kantoj pruvantaj la delikatan observo-kapablon, jen admiresprimoj al la ĉion reganta Amo. Ramon Lull (1235-1316) kantas: «Amo estas ŝtorma maro de ondegaj kaj ventegaj, kiu ne havas havenon nek bordon» kaj plie: «Diru, birdo kantanta, ĉu vi metis vin en servon de mia Amato, por ke li vin gardu de neamo kaj multobligu en vi la amon?» — Respondas la birdo: «Kaj kiu do kantigas min se ne estas la Sinjoro de Amo por kiu neamo estas nehonoro». Poste ni trovas Jacint Verdguer, aŭtoro de mirinde bela kaj profunda scienca poemo laŭ la legendo pri subakviĝo de Atlantido. En multnombraj poemoj kaj verkoj aliaj ni trovas la saman delikatan observo-kapablon, de admiro arda al ĉiuj elementoj ĉirkaŭantaj aŭ impresantaj la aŭtorojn. Inter multaj tiaj de

mi konataj nur nome aŭ tute ne, ve! ni retrovas aliajn de longe tradnkintajn en Esperanto: Adrià Gual, Santiago Rossinyol, kaj eĉ nian Samideanon Frederic Pujulà kun sia «Ĉevalo», tradukita en Esperanto de li mem. Bonega kaj sentplena satiro, pri kruleco de la Toraj luktoj. Unuvorte, veran, daŭran plezuron havigos al si la aĉetanto kaj leganto de tiu bonega libro. Ĝi havu la merititan sukceson en la Esperanta mondo!

El «ESPERO KATOLIKA» (Paris)

Ĝen mirindega verko esperantlingva, kiu postulis talenton, konstantecon kaj laboremon de la kompilinto. Ĝi estas ĉerpita el la literatura neelĉerpebla trezoro de la miljara lingvo de la Katalunoj. La riĉa enhavo dividiĝas jene: I. Antaŭparolo: 1^o La kataluna lingvo (historio, strukturo, teritorio, disvolviĝo). 2^o La kataluna literaturo de la XI^a ĝis la XX^a jarcento. 3^o La Kataluna Antologio kaj Bibliografio. — II. Antikvaj aŭtoroj, de 1235 ĝis 1500. — III. Popolkantoj. — IV. Modernaj aŭtoroj, de 1845 ĝis hodiaŭ. La konciza ekzakteco de la prilingvaj ĉapitroj, en la unua parto, permesas preskaŭ detalan ekkonon de la kataluna gramatiko; la meritplena kompilinto komparas sian gepatran lingvon kun la ceteraj latinidaj idiomoj kaj per fragmentoj Esperantlingva kaj Kataluna de *Ifigenio en Taŭrido* vidigas la relativan similecon inter ambaŭ lingvoj. La dua parto estas tiom riĉenhava kaj praktike aranĝita, ke ĝi povas servi kiel modela verko por studentoj; ĝi nepre anstataŭas ian ajn nacilingvan libron pri tiu fako speciala. La trian parton, kiu donas necesajn kaj valorajn informojn pri la Antologio, ĝiaj celoj, ktp., la kompilinto fermas per jenaj paroloj: «Pro nia domo ni laboris, preparante la Katalunan Antologion, kiu celas diskonigi la trezoron de nia patra lingvo. En nia spirito fajre brilis du nomoj, dum la longa kaj malfacila preparo de nia verko: Esperanto kaj Catalunya... Al la du nomoj, al la du idealoj ni ĉiam donis nian koran fervoron; nur pro tiu entuziasmo ni kuraĝis entrepreni la kolosan laboron de nia Antologio, al kiu ni dediĉis kelkajn jarojn, la plej bonajn jarojn de nia... de mia alie sencela juneco». Kaj tolumante la libron ni aŭdas prozistojn rakonti; poetojn deklami, trobadorojn kanti ludante sonplenan liuton. Kvindek verkistoj estas reprezentitaj en la Antologio, kaj la eldonintoj asertas, ke estas nur parto de la katalunaj literaturistoj; oni ne povis prezenti pli multajn pro la neebleco doni al la verko pli grandan amplekson. Grau Casas kaj aliaj katalunaj samideanoj faris la tradukojn senesepte bonegaj, artistmaj. Menciinda estas la nepre unuakvalita papero kaj la seniproĉe klara preso, kiu ne lacigas la okulon. Samspecaj verkoj pli efikas por la propagando de Esperanto ol la plej entuziasmaj paroladoj. Tial ĉiu esperantisto estas nepre ĝin aĉetonta — la librego ne estas multekosta — kaj montronta al indiferentuloj; ili certe miros trarigardante la

gravan volumon: ĉu do Esperanto ne estas bagatelaĵo? kial tiom grava verko? De la doktrina kaj morala vidpunkto nenio estas riproĉinda. Ni do povas ĝin plene rekomendi al niaj legantoj, kaj ĝoje ni tion faras.

El «LA MOVADO» (Paris)

Grava libro, unu el la plej gravaj en la esperanta libraro. Ĝi estas kompilaĵo de la kataluna literaturo: prozaĵoj kaj poemoj; ĝi enhavas verkaĵojn de antikvaj kaj modernaj aŭtoroj, kaj popolkantojn. En antaŭparolo, S-ro Jaume Grau Casas donas klarigojn pri la kataluna lingvo kaj literaturo, kaj finas, dirante: «... *Pro nia domo* ni laboris, preparante la «Katalunan Antologion», kiu celas diskonigi la trezoron de nia patra lingvo. En nia spirito fajre brilis du nomoj, dum la longa kaj malfacila preparo de nia verko: *Esperanto* kaj *Catalunya*... Al la du nomoj, al la du idealoj, ni ĉiam donis nian koran fervoron: nur pro tiu *entuziasmo* ni kuraĝis entrepreni la kolosan laboron de nia «Antologio», al kiu ni dediĉis kelkajn jarojn, la plej bonajn jarojn de nia... de nia alie sencela juneco.» Tiu libro estas belega monumento al la kataluna literaturo kaj dezirigas, ke en ĉiuj landoj estu starigata sama verko. Laŭ la materiala vidpunkto la libro, grandformata, havas pli ol 400 paĝojn kaj estas presita sur bonega papero. La kompilinto kaj liaj helpantoj meritas plej varmajn gratulojn.

El «UTRECHTA ESPERANTISTO» (Utrecht)

Ni ricevis tiun ĉi gravan verkon 416-paĝan por recenzo. Ĝi estas kompilita de bone konata literaturisto kaj esperantisto Jaume Grau Casas el tradukoj en la daŭro de longa tempo aperintaj en diversaj gazetoj, precipe en «Kataluna Esperantisto», kaj tradukitaj de bone konataj samideanoj.

Mi certe ne troigas, dirante, ke rilate amon al literaturo, niaj katalunaj samideanoj staris ĉiam kaj ankoraŭ staras en la unua vico. Tion pruvis la ĉiam abunda je literaturaĵoj enhavo de «Kataluna Esperantisto», tion pravas nun eldoni de tiom riĉenhava verko, kiel la ĵus aperinta «Kataluna Antologio».

La materialo estas bonege aranĝita kaj aldonitaj estas mallongaj studoj kaj bibliografiaj notoj pri ĉiu aŭtoro. En la «Antaŭparolo», ĝenerala studo pri la lingvo kaj literaturo katalunaj.

La verko estos tre detale recenzata en unu el niaj plej proksimaj numeroj.

La prezo, ŝajne alta (f 5,—), tamen ne estas tro alta, kiam oni konsideras ĝian grave literaturan valoron kaj neniu aĉetinto bedaŭros la elspezon. Multan dankon ni ŝuldas al niaj katalunaj samideanoj, kiuj

riskis entrepreni la eldonon de tia verko. Ni esperu, ke la Esperantista Mondo scios taksu laŭ valoro ilian laboron kaj ke la verko baldaŭ disvendiĝos.

El «KATALUNA ESPERANTISTO» (Barcelona)

Kiom da jaroj la katalunaj esperantistoj bataladis por efektiviĝi la sopiratan revon! Longan tempon kuŝas jam en la eterna ripozo fervoraj samideanoj, kiuj la unuaj bataladis por publikigi nian Antologion. Kiom sopiris al ĝi la karmemora pastro Coll. Kiel ofte li predikis al ni, lernantoj de Esperanto en la Barcelona Universitato, kiom mirigos la mondon la diskonigo de la lingvo de niaj prapatroj, hodiaŭ pli ol iam disvolviĝanta kaj amata. Sed la forto mankis al ĉiu entreprenanto kaj la afero restis en silento ĝis kiam aperis la energia mano, la necedema volo kaj nesuperebla patrujamo de nia kara Jaume. Kun kia fervoro kaj entuziasmo li komencis la kolektadon de la unuaj semoj! Kun kia amo kaj atento li kompletigis la verkon! La plej granda monumento iam farita de la katalunaj esperantistoj al sia gepatra lingvo rapide kreskis, mirinde ellaboriĝis kaj ni ricevis senkomparan juvelon.

Sed kia juvelo, amikoj. El perloj, topazoj, safiroj, rubenoj kaj diamantoj ĝi tuta estas. De la unua ĝis la lasta paĝo oni spiras la spiriton de nia kataluna lingvo, oni gustumas en ĝi la plej delikatajn paĝojn de niaj verkistoj. La tuta gamo de niaj poetoj sonas en viaj oreloj dolĉe, kortuŝe. De la unuaj trobadoroj ĝis la hodiaŭaj famaj Sagarra kaj Rusinyol, la plimulto de niaj stilistoj havas lokon en Kataluna Antologio.

La verko enhavas 94 versaĵojn kun 3576 versoj. La kompilinto tradukis 61 versaĵojn kun 1787 versoj; Josep Grau 29 kun 1682; Rosselló 1 kun 46; V. Inglada 1 kun 29; E. Pellicer 1 kun 16 kaj J. Ventura 1 kun 16. Ses tradukintoj entute. La prozo okupas 251 paĝojn, kies tradukon ni ŝuldas; al la kompilinto 159 paĝojn, Ventura 22, Pujulá 17, Pellicer 10, Grau (Josep) 10, Solà 8, Alberich (S) 5, Torrents 5, Torné 4, Capdevila 3, Dalmau (D.) 2, Bregon 2, Guardiet 2, Gili 1, Dalmau (J. M.) 1. Entute 15 tradukintoj.

Stilo, preso, bindo, papero kaj aspekto estas laŭdinda ĉiuflanke. Nepre la verko atingos lokon en la unua vico de niaj plej famaj ĉefverkoj.

Ni, kiel katalunoj kaj esperantistoj, estas fieraj ke ni sukcesis diskonigi tra la tuta mondo la riĉecon de nia lingvo. Al la kompilinto, nia amiko Grau, ni neniel povos pagi la servon faritan al Katalunujo.

Dankon, plej koran dankon, Grau.

El «LE MONDE ESPERANTISTE» (Paris)

Bela libro, 412-paĝa, lukse eldonita. Ĝi entenas ŝatindan parton el verkoj de multaj diversepokaj aŭtoroj. Tia diverseco, aldonita al la amplekso, konsistigas tre gravan trezoron ŝulditan al meritplena laboro.

EI «INTERNATIONAL LANGUAGE» (London)

It is fairly well known that Spain has many dialects in addition to the official Castilian, but it is not so generally recognised that there are some which are distinct languages, and, in the case of Catalanian, more ancient and perhaps more cultured than Castilian itself. The *Kataluna Antologio* aims at giving to the world by means of Esperanto a comprehensive view and appreciation of the rich and beautiful literature of an ancient and increasingly self-conscious people. It may be said at once that it succeeds admirably.

The origin of Catalanian is lost in antiquity. The first writings date from the XIth century, but it had already existed as a spoken language during at least three centuries previously. It is therefore one of the oldest of the Latin languages, probably the oldest of all. As far as can be ascertained, it is either a direct offspring of Latin, or of the transitional dialect (the «langue d'oc») which also gave birth to Provençal. It has fallen under the influence of the surrounding languages at various periods, and it is surprising to find that in spite of the long domination of Spain, French has exerted the greatest influence. Italian too has greatly helped to form the language, and comparative texts shew a remarkable similarity of vocabulary.

The troubadours, disciples of the Provençal singers, were the first to develop the literature of the language, and it evolved very much on the lines of the other European tongues. It flourished without interruption from the XIIth century, and the «Golden Age» lasted until the end of the XVth century. In the XVIth century Catalonia united with the Castilian monarchy, and there began the long period of decadence which lasted until the end of the XVIIIth century.

In the XIXth century there was a great renaissance, and Catalanian recovered all its old power and beauty, and flourished in all branches of cultural life.

That is a brief history of the language, so little known outside its own territory, which Jaume Grau Casas now presents to the world in this anthology. The book is rich in classical beauty; and more than fifty authors in more than a hundred and forty pieces of prose and verse plead eloquently for their beloved tongue and country.

The compiler has done his work wonderfully well, and the book might well serve as a model for all similar enterprises. The arrangement is perfect, and the translation preserves the beauty of the original to a degree impossible in any other language.

The *Antologio* is divided into four parts. The first gives a description of the history, structure, territory and expansion of the Catalanian language, a history of the various periods and development of its literature, and a bibliography.

Part II. deals with the ancient authors, troubadours, priests, courtiers, soldiers, and kings who were also men of letters. In this and in other parts there is a brief biography and appreciation of each author. The extracts consist of poems, legends, chronicle and declamations, and are worthy to rank with any of the mediæval literatures.

It is naturally difficult to reproduce the mediæval atmosphere in Esperanto, which is essentially modern, but by faithfully following the word order of the originals the translators have succeeded in transferring their charm and *naïveté*.

Part III. is devoted to the Catalonian folksong, and is a clear and truthful mirror of the popular mind. The airs of many are given, and it is very interesting to gain also an idea of the quality of the popular music.

Modern literature (from 1845 onwards) is dealt with in Part IV., and fills threequarters of the book. The compiler tells us that the fifty authors here represent but a part of the Catalonian writers, but the selection is very catholic, and gives an adequate insight into the spirit, and an appreciation of the value of the Catalonian literature. The standard is very high, in fact equal to the general level of the more wide-spread cultural languages, and one is quite illogically surprised, not by the difference, but by the remarkable similarity to the other European literatures.

It is all wonderful, and leaves the impression that one has been in communion with a noble, cultured people, expressing beautifully its ideals and ideas. *Kataluna Antologio* cannot be too strongly recommended, and should be possessed, read, and cherished by all lovers of great literature; it is a magnificent achievement.

El «ITALA ESPERANTA REVUO» (S. Vito al Tagliamento)

L'invito che appare tutti gli anni nei giornali esperantisti a partecipare ai *Floraj Ludoj* che si svolgono a turno nelle città catalane e l'offerta di ricchi premi da parte di ditte e di privati hanno da tempo persuaso gli esperantisti della vitalità del movimento e del fervore dei samideani di Catalogna. Che l'entusiasmo non diminuisca e che i lavori dei *Floraj Ludoj* non siano inutile lo attesta ora la pubblicazione d'un grosso volume di più di 400 pagine, stampato lussuosamente su carta a mano, che riporta oltre a brani e poesie di 53 autori che hanno scritto nella lingua sorella dell'italiana, anche cenni biografici e critici sulla loro vita e le loro opere.

A un chiaro cenno sul territorio di diffusione della lingua e sulla sua morfologia segue una sintesi della letteratura catalana, la quale fa vedere come al fervore delle origini (XI, XII secolo) e alle poesie dei tro-

vatori (XII, XIII) sia seguito il periodo della formazione nazionale (XIII, XIV) e quello classico (XIV, XV); e come solo dopo tre secoli di completa decadenza (XVI, XVIII) sia avvenuto nel secolo passato un nuovo risveglio.

Segue la serie degli autori, disposta cronologicamente. Solo poche pagine (43-76) sono dedicate agli autori antichi (notevole fra questi JAUME I EL CONQUERIDOR, che cantò la conquista di Maiorca) per dar volutamente maggior posto ai moderni; prima di questi e dopo gli antichi sono collocati alcuni canti (pp. 77-105) popolari accompagnati dal motivo musicale, fiori sbocciati anonimi chissà dove e chissà quando.

*Çe la bordo de la mar'
Estis knabino,
Poŝan tukon brodis ŝi
Por la reĝino.*

Ma alla fanciulla manca il filo, che le vien offerto da un marinaio: egli la rapisce ma poi le si rivela figlio del re d' Inghilterra e la sposa.

La parte più importante e più completa è quella dedicata ai poeti moderni e modernissimi: scorrono davanti ai nostri occhi squarci di mare azzuro, lotte dell'uomo contro la natura e poi amore per la terra, amore per la casa, amore per la vita, amore e passione d'una gente che sentiamo sorella alla nostra. Ecco un romantico, ANGEL GUIMERA, morto nel 1924, che in *Terra baixa* contrappone la pura vita fra i monti (quante volte appare in questi poeti l'amore pei monti: canta il poeta popolare: «Montaroj de Kanigo', estas belegaj kaj ĉarmaj, ĉefe nun en la somer', kiam l' akvoj estas gajaj»), a quello della terra bassa e racconta le vendette del pastore che uccide il corruttore della moglie esclamando: «La lupon, mi mortigis la lupon!» e che in *Maro kaj ĉielo* rappresenta i tormenti della monaca che ama segretamente un corsaro. JACINT VERDAGUER canta invece i miti e le glorie del passato e nel grande poema *Atlantido* intreccia le cognizioni scientifiche con racconti favolosi, che possono tuttavia contenere il riflesso di viaggi reali o di cafacismi di cui s' è perduto il ricordo. Si raccosta invece al Guimera un altro prosatore, RAMON CASELLAS, che forse risente pure l' influsso di Gorki e di Tolstoj e che raggiunge talora una grande semplicità anche nel racconto di cose terribili: p. es. in quelle pagine che narrano d'uno stalliere che frustava a sangue i cavalli e che una mattina fu trovato ucciso da un calcio: essi si sono vendicati, ma egli era cattivo con loro solo perchè gli avevano fatta morire in quello stesso modo la moglie incinta. Indi tanti altri autori come JOAQUIM RUYRA e MIQUEL ROGER I CROSA, poeti del mare, come JOAN MARAGALL che in lingua purissima canta cose delicate.

E poi SANTIAGO ROSSINYOL, che scrive come dipinge, e una donna

VICTOR CATALÀ (Caterina Albert), amante delle scene di campagna e celebre per una magnifica novella intitolata «Solitudine» e poi ancora tanti, tanti altri: a dir di tutti non si finirebbe mai. Chi avrebbe sospettata tanta ricchezza, una fonte così copiosa e così limpida? Si sente veramente il sole dei paesi mediterranei:

*Vir' kun grizaj okuloj, plenaj de nordnebul' ,
Elsuçadis oranĝon en haveno-angul' .
Lia rigard' al mi: — Kia sungustol! — diris.
Kaj de liaj okuloj la nebulo foriris.*

Non vien fatto forse di pensare a «En nord' unu pino...»? I samideani di Catalogna (alcuni sono essi stessi poeti e buoni poeti, come appare dalle pp. 275, 320, 348) con questa loro fatica non solo hanno regalato alla *Esperantistaro* un altro libro prezioso, ma hanno fatto opera patriottica a favore del loro paese: hanno mostrato un popolo catalano laborioso, ardente, pronto agli entusiasmi e all'odio, un popolo che viene e che aspetta il suo domani. Riuscire a destare simpatie per esso nel mondo è il miglior premio che potranno avere i compilatori dell'*Antologio*, e l'avranno di certo.

Th. Cart, Prezidanto de la Esperantista Akademio. — Paris

«Tutkore mi dankas por la belega ĵus ricevita libro. Ne atendi mi volas por diri mian sinceran admiron antaŭ tiel grava verko: aŭ pli ĝuste verkaro. Post legado mi ree skribos».

J. M. Warden, L. A. — Edinburgh

«Antaŭ nur kelkaj tagoj mi ricevis mian ekzempleron de via grandioza kaj belega verko: Kataluna Antologio. Ĝi estas, laŭ mia opinio, la plej valora literatura libro jam aperinta en nia lingvo; kaj mi esperas ĝin tralegi kun ĝojo».

D-ro Dietterle, L. A. — Leipzig

«Tre estimata, kara samideano, bonvolu akcepti mian plej koran dankon por la alsendo de via «Antologio». Ĝis nun mi ne sufiĉe povis studadi ĝin, sed mi intertempe trafolumis la tutan libron kaj studadis la unuajn ĉapitrojn, en kiuj vi pritraktas la katalunan lingvon. Mi multon lernis el ili. Certe ĉi tiuj ĉapitroj kaj la tuta libro, kiu montras la abundecon de la kataluna literaturo, estas la plej taŭga propagando por via popolo, pri kiu oni ofte aŭdas malĝustajn kaj erarigajn sciigojn. Klare evidentiĝas el la libro, ke la kataluna popolo estas tute memstara

popolo kun specialaj lingvo kaj literaturo. Mi esperas, ke mi baldaŭ povos pli detale studadi la unuopajn provojn de viaj literaturistoj. Ĝis nun bedaŭrinde mi konis nur du el viaj verkistoj, unu el la longe pasinta periodo, Bertran de Born, kaj Prudenci Bertrana, la lastan el via manuskripto. Helpe de via antologio ĉi tiu malbona situacio baldaŭ ŝanĝigos.

Kompreneble mi nun ne jam povas sufiĉe bone juĝi pri la enhavo de via libro, sed tion mi jam denove povas konstati, kion mi jam konstatis pli frue kaj precipe post la legado de via manuskripto, ke viaj tradukoj ĉiurilate estas bonegaj. Ili tute estas liberaj de la tiel nomataj naciismoj, kiujn oni trovas en tradukoj de aliaj personoj. La stilo de nia lingvo estas tute klara kaj flua, cetere vere belsona. Mi korege gratulas vin».

H. J. Bulthuis. — Haag

«Danke mi ricevis vian belegan, bonegan «Antologion». Ĝi estas vera trezoro».

Bernard Long. — London

«Mi rapidas vin danki *plej* kore kaj sincere pro la sendo de via granda kaj majstra kompilaĵo. Ĝi vere estas bonega aldono al la literaturo de Esperanto kaj mi esperas ke ĝi havos longan vivon kaj fariĝos unu el niaj konataj verkoj. Certe ĝi instigos al multaj la ekstudon de *via* lingvo kaj literaturo.

Mi jam legis, kun multe da intereso, la sekcion pri la Kataluna lingvo mem; ĉar mi tre interesigas pri la komparado de diversaj lingvoj, kvankam (krom Esperanto kaj la franca) mi ne povas pretendi al ia bona scio, aŭ ilin legi facile — des malpli paroli!

Mi sincere gratulas vin, kaj viajn helpantojn, pro la eldonigo de la verko, kaj la bona stilo de la presado ktp.»

Oscar Bünemann, L. K. — Hamburg

«La verko mem, kiun vi sendis, krom ornamo por nia Esperanta biblioteko, estas por mi tre interesa, kaj kun granda scivolo mi jam legis la unuajn dek-ok paĝojn pri la kataluna lingvo kaj la literaturo.

— De tiam ĉiam interesis min via lingvo, kaj ĝia literaturo tia, kia ĝi estas prezentita en via nesuperebla Antologio, certe multe allogas min.

— Multe plaĉis al mi tio, kion sur paĝo 348 de via Antologio Eugeni d'Ors diras «Pri Esperanto». Majstre tradukis via frato la poemon de Alomar sur paĝo 297^a. Nu, sed ĉion mi ne ankoraŭ legis; oni ne povas manĝi la verkon «per unu gluto».

Robert Kreuz, L. K. — Genève

«Kara amiko Grau, mi korege dankas vin pro la sendo de la Antologio. La poŝtisto anoncis ĝin al mi, kiam mi pasis la poŝtveturilon. Samtempe mi vidis ĝin en la oficejo kaj korege gratulas vin pro tiu belega verko. Sed kion mi ankoraŭ multe pli admiras, tio estas via grandega laboro, kiu nur malmultaj povos meritigi, ĉar ili ja ne konas la amplekson kaj malfacilecon de tia laboro. Mi rigardis supraĵe kelkajn, kiuj laŭ titolo altiris min. Bonege! Ĝi estas verko kaj neniu nacio ĝis nun povas glori, havi similan eldonadon. Preso, arango, klareco, ĉio modela».

Gaetano Facchi. — Brescia

«Treege estas al mi interesa. Ĝi montras kia granda estas simileco inter itala kaj kataluna lingvoj, kaj en historia parto kion oftaj estis la rilatoj inter itala kaj kataluna kulturoj».

— La K. A. kiun vi sendis al mi estas tre interesa, ĉu pro la diskonigo de via lingvo kaj literaturo, ĉu pro belaj elĉerpitaj ekzemploj de kataluna prozo kaj poezio. Al ni italoj speciale estas la kat. literaturo interesa, ĉar, kiel pravc estas dirite je komenco de la Antologio, la itala kaj kataluna lingvoj multe similas unu la alian.

— En mia urbo ni gvidas tri esp. kursojn; kaj dum miaj lecionoj mi diskonigas la enhavon de la Kat. Ant. legante al miaj gelemantoj ĵaju ĝiajn paĝojn».

Joseph Berger. — Córdoba

«Vi katalunaj esperantistoj povas fieri pri via «Antologio» kaj esti certaj, ke la cetera mondo admiros laŭmerite la trezoron de via nacia literaturo en internacia vesto».

— «Tiurilate, kio min plej mirfrapis, estas via laborego efektivigita. Ĝi estas, aŭ pli bone estis giganta, sen troigo. La plejmulto el ĉiuj literaturajoj estas la produkto de via senlaca tradukado arta kaj lerta».

— «En la esperanta literaturo ĝenerala la Antologio certe okupos lokon elstaran; ĝi estos, por tiel diri, la Antologio de la Antologioj. Ĉi-jare, ĝi prezentas nepre la plej gravan aperaĵon».

G. J. Degenkamp. — Utrecht

«Sincerdire ni estas vere tre surprizitaj pro la verko mem, pro ĝia amplekso kaj ne sufiĉe laŭdebla arangado, ktp. Koncerne la enhavon mi ne dubas, ke ĝi estas riĉega kaj la tradukado bonega, kion oni povas ĝenerale atendi de katalunaj esperantistoj».

«Mi ne povas sufiĉe admiri la laboron de vialandaj samideanoj, kiuj entreprenis laboron en tia amplekso! Nur mi esperas el tuta koro, ke la laboro entreprenita rikoltu ĉie merititan aŭtŝatadon kaj ke la verko ra-

pide disvendigu. Ĝi multe kontribuos al diskonigado de vialanda literaturo, kun kiu ni, esperantistoj, ofte havas eblon konatiĝi, sed kiu, — kun honto mi devas tion diri — ĉe neesperantistoj, ankaŭ en nia lando, ne estas sufiĉe konata. Kaj ne nur via literaturo, sed via tuta nacio. Ĝenerale oni ne povas prezenti al si, ke katalunoj estas nacio tute aparta kaj ne estanta branĉo de . . . »

M. C. Butler, L. K. — London

«Mi kore gratulas vin pro la apero de tiu belega kaj monumenta verko, kiu estas kredito al vi kaj al via nacio (por diri nenion pri la presisto).

E. Jung. — Strasburge

«Antaŭ ĉio: sinceran gratulon pro la apero de la Kataluna Antologio. Jen granda kaj grava verko, kiu vi estas fininta kun viaj kolegoj, kaj la tuta Esperantistaro ŝuldas dankon al vi pro via donaco. Estas dezirinde kaj esperinde, ke tiu ekzemplo estu sekvata, ke iam la samideanoj havu la eblon, konatiĝi kun la tutmonda verkistaro per bonaj tradukoj, samtempe fidelaj, facile kompreneblaj kaj bonstilaj. Ĉis nun, mi kredas, krom via verko, aperis nur Bulgara Antologio. Kiu sekvos?

Tia kolekto ne nur havigas al ni la ĝuon de belaj versaĵoj, interesaj rakontoj, profundaj filozofaĵoj; ĝi aperigas al ni popolon antaŭe apenaŭ konitan; ĝi naskas la deziron, la postulon: tiaj popoloj ne devas malestigi pro ŝtataj kaŭzoj; ĝi estas krio, kriego al ia homaro: jen la koro de nia popolo aperinta pere de nia lingvo; ĉu tiu lingvo devas sufokiĝi? ĉu tiu koro devas mortigi senigite de sia lingvo?

Esperanto, de la kontraŭuloj mensoge kulpigata, ke ĝi malestigos la naciajn lingvojn, nun male aperas — por ĉiu, kiu volas vidi — kiel profektanto de la lingvoj, konigonta tra la mondo la literaturon eĉ de malgrandaj popoloj, havigonta al ili amikojn, unuigonta la tutmondajn samsuferulojn, kiuj deviĝas obstine batali por konservi la gepatran heredaĵon: karegajn kutimojn kaj la lingvon, kiu pli bele sonas ol iu ajn fremda».

Edmond Privat, L. A. — Genève

«Nenie pli bone aŭ pli trafe ol en via bela lando oni sukcesis mortigi la kalumnian asertaĵon ke esperanto malfavoras naciajn kulturojn. Per la «Kataluna Antologio» vi donis al la mondo la rimedon eklerni pri via nacia literaturo ĝuste pere de nia internacia helplingvo. Per la Floraj Ludoj vi ebligas nian komunan literaturon plikreski en tuta mondo per varma brilo de la kataluna suno».

Reginald Banham. — Melbourne

«Ĵus traleginte la «Katalunan Antologion» mi ekprenas la plumon por sendi al vi ĉiuj mian elkoran gratulon pro la bonegaĝo enmondigita, ĉar iuj kuraĝuloj arde kaj vere patriotecaj, kaj havantaj fidegon al nia kara movado, donadis ne malgrandan viveron por tiu tasko laŭdinda. Sukceso estu via rekompenco! Komprenoble, en tia grandampleksa verko unu elektaĵo estas pli facile legata ol alia; tamen, vidata larĝe, la libro estas traesplorata sen tro granda cerbstreĉo».

W. H. Staveley. — Preston

«La libro tre surprizis min, kaj kiam mi jam tranĉis la paĝojn (sufiĉe grava laboro!) kaj unue foliumis ilin, mi surprizigis des pli multe. Kia giganta laboro! Kia belega libro! Kia senerara verko! Mi legis multajn paĝojn elektitajn sen zorgo, sed ĝis nun ne trovis eĉ unu preseraron. Ŝajnas ke la verko estas senmakula. Kaj la tradukoj! Mi devas konfesi ke mi pliparte legis la prozon, ĉar la prozon pli plaĉas al mi legi. Kvan-kam mi estas muzikisto, tio estas, artisto, mi pli ŝatas la realaĵojn en la vivo, kaj mi min turnis al la prozoj. Mi trovis ilin perfektaj, stile kaj klarece. Mia estinta amiketo kiu skribis mallongajn pro nesperto post-kartojn jam fariĝis grava, gravega, verkisto! Mi tre dankas vin miaparte pro via laboro, kaj mi opinias ke la Esperanta mondo ŝuldas al vi ĉian dankon».

Teo Jung. — Horrem bei Köln

«Mi ĝojas, ke mi nun povas persone konatiĝi kun la anoj de tiu popolo, kun kies animo mi jam konatigis per la verkoj de viaj famaj poetoj tiel majstre interpretitaj de via samnaciانو S-ro Grau Casas en la «Kataluna Antologio», kiu estas ĝis nun unika verko en la traduka Esperanta literaturo kaj kiu povos servi kiel modelo por ankoraŭ sekvontaj antologioj de aliaj nacioj».

Emma L. Osmond. — London

«La mezo de la 19^a jarcento estis rimarkinda pro la reviviĝo de nacioj ŝajne malfortaj kaj eĉ mortontaj. Nun ili staras kun renovigita forto, pro la sindonemo kaj naciismo de siaj poetoj kaj verkistoj. Inter ili troviĝas Katalunujo.

Usona verkisto, Ralph W. Emerson, diris, «Ligu vian veturilon al stelo». Sola inter la «malgrandaj nacioj», Katalunujo tion faris, ligante sian nacian lingvon al la nove aperinta stelo, Esperanto. Nun per Esperanto, la cetera mondo havas la okazon konatiĝi kun la literaturo, antikva kaj moderna, de katalunaj verkistoj.

Laŭ mia opinio, Kataluna Antologio estas la plej grava Esperanta libro ĝis nun eldonita; ĉar ĝi malfermas vojon al la kulturo de fremda lando. La enhavo estas miriga, la aranĝo bonega, la lingvaĵo simpla kaj facila sed esprimplena kaj fundamenta. Speciale laŭdindaj estas la skizo pri kataluna lingvo, la biografiaj notoj, kaj la bonstilo de la diversaj tradukaĵoj. La Antologio estas bela florbedo en la Esperanta ĝardeno».

E. F. Cense. - Warszawa

«Kia belega libro! Ĝi estas la unua verko tiel ampleksa kaj tiel enhavoriĉa en la tuta Esperanta Literaturo. — Mi ne legis la tutan libron, sed la impresoj estas bonegaj».

Verkoj de Jaume Grau Casas



Amaj Poemoj	1 sv. fr. frankite
La Kataluna Popolkanto	1 » » »
Kataluna Antologio	11 » » »
Poemo de Amo kaj Doloro	En presado
La Trobadoroj Provencaĵaj kaj Katalunaj	En preparo